TEJO-aktuale: numero 43, 2002-01

## INTERNACIA JUNULARA KONGRESO: RETPAGHO KUN ALIGHILO

La venonta Internacia Junulara Kongreso (IJK) okazos de la 21a ghis la 28a de julio 2002 en Pato Branko, Brazilo. Informojn kaj alighilon vi trovos en la belega pagho http://www.tejo.org/ijk/.

## EUROSCOLA EN ESPERANTO ANKAU EN 2002!

Post la sukceso de la jaro 2001, Euroscola (rolludo por gimnazianoj che la Europa Parlamento) ankau en 2002 certe okazos ankau en Esperanto. Estas interkonsento pri du datoj: la 19a de marto kaj la 17a de aprilo, kun po 35 esperantlingvaj gelernantoj. Ankorau restas iom da liberaj lokoj, sed urghas anonci sin al Xavier DEWIDEHEM xavy.fr@caramail.com, respondeculo pri la retejo E-euroscola http://e.euroscola.free.fr.

## RETEJO DE SVEDA ESPERANTO-FEDERACIO: PLI OL MILIONO DA VIZITOJ EN 2001

La retejo de Sveda E-Federacio povis registri 1 037 966 vizitojn dum la jaro 2001, la plej alta kvanto depost la eknombrado en februaro 1996.

Franko Luin franko@omnibus.se